der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde der DDR im Deutschen Kulturbund

8. Jahrgang Nr. 53 Mai – Juli 1972 30 Pf

Georgi Dimitrov

Georgi Dimitrov vivis de 18. 6. 1882 ĝis 2. 7. 1949. 1900 sindikata sekretario. 1919 kunfondito de KPB. 1923 elmigranto, ĉar en Bulgario mortkondamnita. 1935 ĝis 1943 Ĝenerala Sekretario de la Komunista Internacionalo. Depost 1946 ministroprezidanto de Bulgario.

La bulgara patrioto kaj elstara proletar-revolucia internaciisto Georgi Dimitrov estas nomata „heroo de Leipzig“ (elparolu Lajpcig). Antaŭ 20 jaroj, okaze lia 70-a naskiĝtago, en historia domego de Leipzig, en kiu Georgi Dimitrov venkis la germanan faŝistan imperialismon, estis malfermita honormuzeo. Samtempe tiu domego, la iama Regna Tribunalo (Reichsgericht) ricevis la nomon „Georgi-Dimitrov-Muzeo“. Do okazis fundamenta funkciŝanĝo de tiu konstruaĵo – iam sidejo de la plej supera instanco de la germana imperialista klasjusteco – nun kulturcentro plenumanta la transheredaĵon de Georgi Dimitrov, de komuna bataltradicio de la bulgara, germana kaj internacia laboristaro, pruvanta la internacian pozicion de la Germana Demokratia Respubliko.

Antaŭ la Regna Tribunalo Georgi Dimitrov – kune kun pluraj du bulgaraj komunistoj, germano kaj nederlandano – estis akuzata pro incendio en la Regna Parlamento (Reichstag) en Berlin de 27. 2. 1933. Dum la proceso, kiu komencis la 21-an de septembro 1933, Georgi Dimitrov ne

pravigis sin kiel akuzito. Li fariĝis akuzanto. Pro severa izoleco en malliberejo tiutempe ne estis konataj al li la tutmondaj amasprotestoj. Ankaŭ ne estis konataj al li la rezultoj de kontraŭproceso okazinta en London kaj la t. n. „Bruna Libro“. Tamen plensukcese kaj trafe li atakis, senmaskigis kaj akuzis la nazifaŝistajn ĉefulojn per mirinde klaraj argumentoj. Georgi Dimitrov dum la proceso pruvis, ke la incendio en la Regna Parlamento senescepte estis en entereso de la nazifaŝista terurreĝimo. Li recitis i. a. Goethe, ke li ne estas amboso sed martelo. Verve li defendis la komunisman mondpercepton kaj Sovetunion.

Ĉiutage dum la proceso en Leipzig antaŭ la Regna Tribunalo atendis civitanoj, kiuj volis esprimi al Georgi Dimitrov admiron kaj simpation, kiujn li ĝuis pro sia heroeca sinteno ĉe vastaj tavoloj de la civitanaro. Lia kuraĝa, necedema kaj ofensiva argumentado antaŭ la sangoavida faŝista klastribunalo estis efika instruado al la kontraŭfaŝistoj okaze ilia arestigo kaj akuzigo antaŭ nazifaŝista tribunalo. Li kuraĝigis la kontraŭfaŝistojn en Germanio kaj la batalantojn por socialismo/komunismo en tuta mondo. Tio estis antaŭ preskaŭ kvardek jaroj.

La „Georgi-Dimitrov-Muzeo“ depost sia ekzisto, depost 20 jaroj, estas proletar-revolucia propagandejo, kiun vizitas homoj el tuta mondo. En la 20 jaroj de sia ekzisto la „Georgi-Dimitrov-Muzeo“ nombris ĉirkaŭ 1 200 000 muzeo-vizitantojn el pli ol 100 ŝtatoj, inter ili multaj elstaraj reprezentantoj de la internacia laborista movado. El eksterlando venis en la muzeon plej multaj civitanoj el la gepatra lando de Georgi Dimitrov, el la amika socialista Bulgario, kaj el Sovetunio. Kompreneble vizitis la muzeon ankaŭ nemalmultaj gastoj el la aliaj socialistaj landoj kaj el kapitalistaj landoj. Civitanoj de GDR reprezentas la pli multon de muzeo-vizitantoj, precipe estas grupoj de geknaboj el lernejoj, gejunuloj kaj laborkolektivoj.

De jaro 1967 la „Georgi-Dimitrov-Muzeo“ havas novan flankon de kulturlaboro por disvastigo de la revoluciaj tradicioj interlige kun vivo kaj batalo de Georgi Dimitrov.

En jaro 1967 unuan fojon venis en la Georgi-Dimitrov-Muzeon laborkolektivoj, kiuj havas la honoran nomon „Georgi Dimitrov“. Ili interkonsentis, ofte kunveni kaj interŝanĝi laborspertojn specialigitajn laŭ la fakaj taskoj de la kolektivoj. Depost 1967 renkontiĝas tiuj laborkolektivoj ĉiujare en la „Georgi-Dimitrov-Muzeo“. Ĝis nun en GDR ekzistas, laŭ informoj de la „Georgi-Dimitrov-Muzeo“, minimume 200 „Georgi-Dimitrov-laborkolektivoj“. Almenaŭ tiom en la muzeo estas konataj. Kelkaj laborkolektivoj ankoraŭ luktas por meriti la nomon „Georgi Dimitrov“.

Dum la 20 jaroj estas plenigitaj ok gastlibroj en la muzeo. El ili estu citataj du enskribaĵoj de GDR-vizitantoj.

Pioniroj kaj gejunuloj de lernejo en Schmiedefeld/Turingio, kies pionirunuo honornomas „Georgi Dimitrov“, en la muzeo promesĵuras, ĉiupove lerni kaj batali kiel Georgi Dimitrov.

Membroj de Berlin-a brigado je nomo „Georgi Dimitrov“ el la entrepreno eksporto/importo de laborilmaŝinoj kaj laborinstrumentoj la 4. 12. 1971 enskribis i. a.: Ni luktas por akiri titolon „socialista brigado“. La vizito de la muzeo ebligis al ni, profunde studadi la krean revolucian agadon de Georgi Dimitrov. En tiu historia loko ni promesas, streĉi ĉiujn fortojn por honore porti la brigadnomon „Georgi Dimitrov“.

Georgi Dimitrov restas por ĉiam instruanto kaj elstara internacia pioniro de batalo por feliĉa vivo en komunismo! *O. Bässler*

Sukcesaj elektoj

En la monatoj marto ĝis majo de ĉi-jaro la distriktaj esperanto-estraroj (Distriktaj laborrondoj Esperanto) estis novelektitaj. Tiuj elektoj estis grava parto de apliko de la decidoj de l'VIII-a partitago je la agado de la esperantistoj de GDR. Oni ne nur demokrate elektis novajn estrarojn kaj delegitojn por la Centra Konferenco en Berlin, oni same resumis la ĝisnunan staton kaj skizis la vojon irendan. La multaj bonaj ideoj, esprimitaj en la referaĵoj kaj diskutoj, la debatoj pri la projekto de la novaj gvidprincipoj por la agado de la esperantistoj de GDR, ĉio-ĉi estis bona preparo por la Centra Konferenco de la esperantistoj de GDR, okazinta la 27-an kaj 28-an de majo 1972 en Berlin. Dum tiu Centra Konferenco, kiun partoprenis ĉ. 180 delegitoj el la tuta respubliko estas fiksitaj la ĉeftrajtoj de la estonta laboro esperanta en GDR. Krome oni en sekreta baloto elektis la novan Centran Laborrondon Esperanto de GDR en Germana Kulturligo, la plej alta gvidantaro de la esperantistoj, organizitaj en la Germana Kulturligo, plene komparebla kun ĉiu ĉefestraro de landa asocio.

En la centro de la intereso en la distriktoj staris jenaj problemoj: — La plenumo de la ĉeftasko, apliki Esperanton en la servo de la socialisma socio, la ĉi-lige necesa plivastigo de la bazo por nia laboro, kaj do la dialektiko de per — kaj poresperanta laboroj. Specialan atenton kompreneble ĉi-rilate ricevis la stato de la amikaj rilatoj kun la esperantistoj de la socialisma ŝtataro, la partopreno en la kontraŭimperiisma batalo kaj la pliigo de la socia efiko de la esperantistaj agadoj. Por finredakti la projekton de la „gvidprincipoj" CLR ricevis amason da proponoj, korektoj, aldonoj kaj plibonigoj kiuj ĉiuj estas serioze konsiderataj.

En multaj distriktoj la oficialan parton de la kunvenoj kompletigis interesaj programeroj. Speciale citindas la partopreno de 8 polaj amikoj en Prenzlau (Neubrandenburg); prezento de folkloraj kanzonoj en Esperanto per s-ino Gerda Lapoehn en Potsdam; interesega prelego de dro Ivens pri internaciaj aktualaj problemoj kaj sperta raporto „Kiel oni konstruas vortaron" de E. D. Krause, ambaŭ en Leipzig, en Berlin profesoro dro Falkenhahn parolis pri lernunuoj en Esperanto kaj nacilingvoj; en Rostock diapozitiva prelego pri Londono, soveta kolora esperanto-filmo en Magdeburg k. t. p. Resume ĉio-ĉi estis promesplena starto en la nova etapo de nia laboro; la iniciatoj daŭru kaj multiĝu!

— e

(Daŭrigo de pĝ. 20)

Riĉaj pro sia enhavo estis la vesperfestoj: tiu de centra Rusio, Siberio, Ukrainio, Baltiaj landoj. Ufanoj kune kun barnaulanoj preparis eĉ Esperanto-„operon". Ĉan Kuan Ngek el Vjetnamio, partopreninto de bataloj kontraŭ usona agresio, prezentis kanton de partizanoj „Ĝangalo". Tiu ĉi kanto ĉiam sonis dum la tendaro, esprimante solidarecon kun la suferanta popolo de Vjetnamio.

Ĉe vasta Dnipro estiĝis vasta amiko rondo. Ĝis revido, kara amikar', en Siberio, en SEJT-14! *(El Horizonto de Soveta Litovio" 3/71)*

Miĥael Cimberov, Jalta

Munkeno - urbo de XX. Olimpikaj Ludoj, urbo de malsamaj tradicioj

Nuntempe miloj da sportistoj de la mondo streĉe preparas sin por partopreni la Somerajn Olimpikajn Ludojn en Munkeno. Ĉiu lando sendos siajn plej spertajn kaj eminentajn sportistojn. Tamen ja gravas ne nur sporta preparado, ĉar la Olimpikaj Ludoj estas nek nur demonstro de sportaj atingoj sed samtempe manifestado de internacia amikeco, ĝia disvolvo kaj plifortigo.

Des pli gravas preparado por ĉi flanka agado, ĉar ĉi-tiuj someraj ludoj okazos en Munkeno — urbo de du malsamaj sed gravaj historiaj eventoj por la mondo.

La plej multaj homoj konas la rezulton de la Munkena perfida kontrakto en 1938a jaro, kiu alportis multe da malfeliĉo por la homaro. Bedaŭrinde post la IIa mondmilito aktive agis kaj agas en Munkeno revenĝismaj fortoj.

Sed ĉi-tiu urbo havas tute malan mondsignifan historion, pri kiu scias tro malmulte da homoj en la mondo. Multaj scias iomete, ne tro atentas esplorinte la faktojn.

Komence de ĉi-tiu jarcento en la jaroj 1900, 1901 kaj 1902 por kelkaj monatoj en Munkeno loĝis kaj agis Vladimir Iliĉ Uljanov-Lenin. En ĉi urbo Vladimir Iliĉ realigis la multjaran revon eldoni gazeton por helpe de tiu fondi partion de laboristaro, la rusan partion, kiu ricevis la nomon de bolŝevikoj-komunistoj. Dum la jaroj en Munkeno estis eldonitaj 13 numeroj de la gazeto „Iskra", la grava gvidilo de la soveta kaj tutmonda proletaroj.

En Munkeno Vladimir Iliĉ verkis tre gravajn artikolojn kaj librojn. La verkoj estiĝis organiza kaj filosofia fundamento ne nur por la bolŝevika partio sed por la komunistaj kaj laboristaj partioj de la tuta mondo.

Menciendaj estas la artikolo: „De kio komenci", libro „Kion fari". 70jarojn antaŭe, en la jaro 1902a Vladimir Iliĉ unuan fojon uzis pseŭdonimon **V. I. Lenin.**

V. I. Uljanov uzis ĝis la artikolo: Agrara demando kaj „kritikuloj" de Marx la pseŭdominon V. I. Lenin, kaj poste ofte uzis diversajn pseŭdonimojn, sed post aŭtuno de 1902 j. pli kaj pli ofte uzadis — V. I. Lenin, kiu fakte estiĝis lia unua familinomo kaj en la mondo Leninismo estiĝis la pli influa vivkoncepto.

En ĉi urbo Uljanov-Lenin kaj liaj kunuloj sukcese preparis la duan partikongreson de kiu komenciĝas la historio de la rusa komunista partio.

La homaro devas scii kaj memori, ke ĉi-tie en Munkeno komence de ĉi-tiu jarcento loĝis kaj agis Vladimir Iliĉ-Uljanov-Lenin — gvidanto kaj instruisto de la homaro.

Lingva problemo

Afiŝo pendas je soleca franca hotelo:
„Ĉi-tie oni parolas 6 lingvojn!" Eksterlandano, kiu nur tre malfacile kapablis solvi la lingvan problemon kun la hotelestro, demandis tiun: „**Kiu** do parolas la ses lingvojn ??!!"
La respondo de la estro: „Miaj gastoj!"

A. Vaitilavičius, Vilnius

Riĉeco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj

Riĉeco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj Okupiĝi pri tiu ĉi temo min instigis unuavice recenzo de d-ro P. Neergaard pri esperantlingva traduko de fabeloj de Andersen (Heroldo de Esperanto, no. 8, 1963). La recenzanto plendis tie, ke en Esperanto mankas sinonimoj, ke li eĉ diagnozas ĉe nia lingvo anemion. Alia instigo estis iam aŭdata opinio, ke Esperanto, kiel artefarita lingvo, estas malriĉa, ne sufiĉa por esprimi ĉiujn bezonojn, ĉiujn sentojn de homo, tial ne taŭga almenaŭ por beletro. Kiel ekzemplon de tiaj opinioj mi citas liniojn de sovetia lingvisto A. Reformatskij el lia lingvistika lernolibro: „Esperanto tre rapide disvastiĝis en multaj landoj, unuavice inter kolektanoj (precipe filatelistoj), sportistoj, eĉ komercistoj, ankaŭ ĉe iuj filologoj kaj filosofoj; en Esperanto aperis ne nur instrurimedoj pri Esperanto, sed ankaŭ varia literaturo, ankaŭ beletra, traduka kaj originala; *ĉu tiun ĉi lastan indas subteni — estas dubinde, ĉar Esperanto kaj similaj lingvoj ĉiam estas duavicaj kaj „poraferaj", t. e. ekzistantaj ekster limoj de stilistiko.*

Esperanto estas ĉiam uzata kiel helpa, duavica, eksperimenta „lingvo" en kompare malvasta „medio" (paĝo 417 de la litova eldono; traduko kaj substreko mia). Pri riĉeco de naciaj lingvoj krias dikaj vortaroj, enhavantaj centmilojn da vortoj. Ekz. en deksepvoluma vortaro de nuntempa rusa literatura lingvo estas 120 480 vortoj, akademia vortaro de litova lingvo, ĝis nun presita ĝis litero „O" inkluzive, havas jam 149 076. Kaj la esperanta „Plena Vortaro" (laŭ eldono de 1953) enhavas nur 7 866 radikvortojn!

Eĉ vidaĵo de la vortaro, presita per etaj literoj sur maldika papero, sugestas la malriĉecon. Esperantistoj mem la internacian lingvon ofte nomas helpa kaj kelkaj pensas, ke ĝi ne sufiĉe taŭgas por beletro.

Do, estas pli ol sufiĉe da kaŭzoj por studi la temon kaj peni klarigi, kia estas la situacio reale. Por plenumi tiun ĉi taskon ni devas unue ekrigardi, kio prezentas riĉecon de lingvo, kio estas materiala bazo de la riĉeco.

Mi vidas tri plej gravajn kategoriojn de la riĉeco: 1. vorttrezoro, aŭ vortara konsisto de lingvo; 2. frazeologiaj formoj, aŭ idiomaĵoj; 3. gramatikaj formoj.

Vortara konsisto de lingvo

Vortaran konsiston de iu lingvo estigas ĉiuj vortoj ekzistantaj en ĝi. En tiu ĉi granda komplekso de vortunuoj elstaras negranda ĝia parto, t. n. b a z a v o r t a r a f o n d u s o. Tiu ĉi fonduso entenas la plej bezonatajn vortojn, komunajn por ĉiuj tavoloj de la koncerna nacio, por ĉiuj tempoj aŭ almenaŭ por granda spaco de tempo, kaj por ĉiuj okazoj. La difino povas ŝajni al iuj legantoj, ke la baza vortara fonduso devas esti preskaŭ senlima. Sed estas inverse. „Por ĉiuj tavoloj de la nacio" signifas, ke la vortojn devas kompreni ĉiuj. Pro tio al la fonduso ne apartenas p r o f e s i i s m o j (vortoj uzataj nur de apartaj profesiuloj) kaj d i a l e k t i s m o j (vortoj uzataj nur en malvastaj partoj de koncerna lingva teritorio). „Por ĉiuj tempoj" signifas, ke la vortoj de la baza fonduso devas esti komprenataj dum longa tempo, almenaŭ por

1—2 jarcentoj. Pro tio al ĝi ne apartenas vortoj antikviĝintaj, forgesitaj aŭ jam ne aktualaj dum longa tempo. „Por ĉiuj okazoj“ signifas, ke la vortoj de la baza fonduso devas esti taŭgaj egale por buŝa kaj skriba lingvo, por prozo kaj versaĵo, por teatro kaj publicistiko.

Tiamaniere la baza, aŭ la plej ofte uzata kvanto de vortoj estas multe pli malgranda ol tuta havaĵo de koncerna lingvo. Kvanto de vortoj, kiujn uzas aparta homo aŭ certa grupo, povas esti tre diferenca. Laŭ J. Vandries, analfabetaj vilaĝanoj uzas por rilatoj inter si nur 300 vortojn. Por ĉiutaga uzado de instruistoj, kuracistoj, inĝenieroj sufiĉas 2—3 mil vortoj, juristo uzas ĝis 10 mil, ĵurnalisto — ĝis 20 mil. En Malnova Testamento de Biblio oni trovas 5 800, en la Nova — 4800. En verkoj de Homer estas 9 mil vortoj, Schiller uzis 16 mil, Shakespeare — 20 mil. En verkoj de Puŝkin, laŭ speciala studo (Slovar jazika Puŝkina, vol. I—IV, Moskva 1956—1961), oni trovis 21 mil vortojn. Evidentiĝis tamen, ke duono de tiuj ĉi vortoj en ampleksa 16-voluma verkaro de Puŝkin estis uzata entute nur unu- aŭ dufoje. Kaj tiu ĉi kvanto de vortoj sufiĉis por krei mondfamajn ĉefverkojn de prozo kaj poezio.

El tio ni vidas, ke en uzo troviĝas nur negranda parto de vortoj el la grandaj naciaj vortaroj. La plej granda parto restas kiel senmova, „enfrostiĝinta“ balasto, konsistanta el arkaismoj, dialektismoj kaj profesiismoj.

Tamen iun ajn riĉaĵon oni taksas ne nur laŭ kvanto, sed ankaŭ laŭ kvalito.

Kia devas esti bonkvalita vorto? Ĝi devas klare esprimi certan nocion, esti belsona, mallonga.

La belsonecon taksi estas tre malfacila tasko, ĉar la juĝo treege dependas de individua, nacia, rasa gusto. Komparu ni tion kun belsoneco de muziko kaj kanto — la gustoj ĉi tie tre diferencas. Tial ni rifuzu taksi diversajn lingvojn laŭ tiu ĉi indikilo. Tamen ni menciu tre disvastiĝintan en Eŭropo opinion, ke itala lingvo estas unu el la plej belsonaj kaj Esperanto sonas tre simile al ĝi.

Mallongeco de vortoj estas bona eco, ĝi ŝparas tempon kaj paperon. El eŭropaj lingvoj rekordon tiusence havas verŝajne angla lingvo, ĝin proksime sekvas la franca. Nek germana, nek rusa, nek litova lingvoj povas laŭdi sin per granda procento de mallongaj vortoj. Esperanto estas pli mallonga kompare kun la menciitaj lingvoj. Tion atestas paralele presitaj tekstoj. Ofte ni vidas tiajn en „der esperantist“, eldonata en GDR. Sed longeco de vortoj ne povas malutili al klareco de lingvo. Tiu ĉi lasta kvalito de lingvo estas la plej grava. Tial ni plej multe analizos tiun ĉi econ de apartaj vortoj. Kaj la klareco de apartaj vortoj plejparte destinas klarecon de tuta lingvo.

En ĉiu nacia lingvo estas multaj vortoj egale sonantaj aŭ skribataj, sed havantaj diversajn sencojn, la t. n. h o m o n i m o j. Ekz. en litova lingvo la vorto „kasà“ havas ne malpli ol 8 sencojn: harligo, kaso, lieno, pankreo, plektaĵo, grapolo, rubando, aro. La rusa vorto „predstavlénije“ havas 6 tute diferencajn sencojn: prezento, deklaro, spektaklo, imago, kompreno, pereo de la mondo. Rusa lingvo per sama vorto esprimas cepon kaj pafarkon (luk), fajrilon kaj avangardulon (udarnik), plankon kaj sekson (pol), ŝlosilon kaj fonton (ključ), persisti kaj infuzi (nastojatj). La rusa vorto „idti“ havas, laŭ kalkulo de lingvistoj, 20 sencojn, la vorto „spustitj“ — 7, „stojatj“ — 17 sencojn, ktp. Se vi trarigardos iun grandan vortaron, vi ekvidos, ke plejmultaj vortoj havas po kelkaj sencoj.

Multaj homonimoj ekzistas en franca lingvo, precipe vortoj, kiuj ne diferencas prononce, kvankam skribe ili estas diferencigataj per mutaj literoj. Ekz. la sono „sé“ havas almenaŭ 6 diversajn sencojn: brusto, sana, sankta, kvin, surskribo, zonita. La vorto „mise“, sen ŝanĝo de skribmaniero kaj prononco, en solestara pozicio havas 7 malproksimajn inter si sencojn: veto, plipropono (en aŭkcio), vestiĝmaniero, kostumo, permeseblo, deponaĵo, investo, nasko (de animalo). En akompano de aliaj vortoj ĝi akiras, laŭ „Franca-rusa vortaro“ de K. Ganŝina (1957), ankoraŭ 59 aliajn sencojn. Ne perdante tempon por mencii ilin ĉiujn, ni frontigu nur la plej kontraŭdirajn kaj plej malproksimajn: enkarcerigo kaj liberigo, preno sub gardon kaj forpermeso, averto kaj posedigo, nudigo kaj vestiĝmaniero, prezentado kaj postulo, ktp. ktp.

Rekordon en multsenceco de vortoj tamen havas verŝajne angla lingvo. Ekz. la vorto „figure“ havas ne malpli ol 30 sencojn, „ground“ — 50, „cut“ — 62, „stand“ (lige kun helpaj vortetoj) — pli ol 100. Ne perdante tempon por listigi tiujn sencojn, ni prenu iun ajn grandan vortaron de angla lingvo kaj ni ekvidos grandegajn nestojn de apartaj vortoj por klarigo de diversaj sencoj de unu vorto. Prenu ni nur la malgrandan „English-Esperanto Dictionary“ de F. Fulcher kaj B. Long. Ĉi tie homonimoj estas presitaj aparte, ne en nestoj, kaj en ĉiu paĝo ni ekvidas pli aŭ malpli longajn vicojn de egalaj sed malsamsencaj vortoj anglaj, kiuj en Esperanto havas apartajn vortojn por diversaj sencoj. Anglan lingvon lingvistoj agnoskas kiel unu el la plej riĉaj. Kaj tiu riĉulo per la sama vorto nomas azenidon kaj ĉevalidon (foal), trompi, ŝerca, arlekini kaj stultulon (fool), necesejon kaj malgrandan ŝtatsigelon (privy), klientaron, kutimon, patronecon, moron kaj doganon (custom), elfluon, eliĝon, numeron (de revuo), eldonon, finiĝon, idaron, diskutobjekton, rezulton kaj ankoraŭ aliaj aferojn (issue).

(El „Horizonto de Soveta Litovio 1/71)

Daŭrigo sekvos.

ESPERANTON EN ETERON!

Iom post iom Esperanto penetras radioamatoran rondon. Amatora stacio UK2BBB el Vilnjus regule alvokas kolegojn en la internacia lingvo. Sur 10-metra diapazono (frekvenco 28.600 kc) ni kontaktis kun Argentino kaj Brazilio. Sur 15-metra diapazono (frekvenco 21.260 kc) ni havis kelkajn agrablajn rendevuojn kun esperantisto el Barnaulo Gena J. (voksigno UW9YE). Pli ol horan interparolon ni havis kun s-ro Pit el Stuttgart (voksigno DL6UU) sur 20-metra diapazono (frekvenco 14.210 kc).

Sur 40-metroj (frekvenco 7.080 kc) ni esperas baldaŭ renkontiĝi kun esperantisto-radioamatoro SP6PAM el Bjalistok, naskiĝurbo de Zamenhof.

Vi, verŝajne, jam komprenis, ke la notitaj frekvencoj estas tiuj, kiujn ni uzas por alparoli Esperanto-staciojn. Nia stacio (interalie, unu el la plej fortaj kaj aktivaj en Litovio) atendas novajn peresperantajn kontaktojn en SSB ekde 10.45 GMT (Grinviĉa tempo); lunde — 20 m, merkrede — 40 m, vendrede — 15 m. Ankaŭ dum alia tempo (5.00 — 15.00 GMT) ekaŭdinte UK2BBB proponu paroli en Esperanto.

V. Šilas

(El „Horizonto de Soveta Litovio“ 2/71)

NOVAĴOJ EL POLLANDO

La 4-an kaj 5-an de aprilo ĉijara okazis en Sopot, apudmara pola urbo, 3 interesaj E-aranĝaĵoj:

1. la solena malfermo de Esperanto-muzeo,

2. la Tutpollanda Konferenco de Esperanto-instruistoj kaj

3. la printempa renkontiĝo de la membraro de la Tutpollanda Klubo de Interesiĝo „Esperanto" apartenanta al Pola Filatela Asocio (PFA) en la Kraków-a regiono.

La solena malfermo de Esperanto-muzeo troviĝinta en la supra etaĝo de moderna Mezlernejo n-ro 8 kun la nomo de la fama pola artpentristo Jan Matejka okazis la 4-an de aprilo. La lerneja direktoro s-ro Józef Golec ricevis el la manoj de la honoraj gastoj s-roj Nguyen Van Bang kaj Kim Anh, reprezentantoj de la VDR-ambasadejo en Warszawa, valorajn donacojn de la vjetnama esperantistaro — inter la donacoj ankaŭ estis ore brodita standardo kun esperantlingva surskribo. Pluaj donacoj de aliaj gastoj estis libroj, ĵurnaloj, gazetoj, afiŝoj, bildaj kaj skribaj dokumentoj, eĉ ŝipa flago de la motorŝipo „Zamenhof". Imprese estis aranĝita la korespondaĵaro de la plej junaj geesperantistoj — infanoj, kiuj lernas Esperanton en la lernejo. Bonege la leteroj kaj poŝtkartoj, ofte mem desegnitaj, montris, kiel la infanoj kontribuis al interpopola amikeco.

La loka kaj distrikta gazetaro tre vigle raportis en bildo kaj skribo pri ĉi tiu aranĝo kaj pri la Tutpollanda Konferenco de Esperanto-instruistoj. En la urbo per grandaj pol- kaj esperantlingvaj afiŝoj oni zorgis pri la informado.

La Tutpollanda Konferenco de Esperanto-instruistoj okazis en la granda sporthalo de la sama lernejo, el kiu la organizantoj formis agrablan kongresejon. Per referaĵoj kontribuis tiel konataj kaj spertaj esperantistoj kiel magistro Tyburcjusz Tyblewski, Stefania Palica, prof. Józef Toczyski, direktoro L. Siekiersi, magistro M. Krausowa kaj aliaj. Bedaŭrinde la prelegoj estis en pola lingvo do ne kompreneblaj por la raportinto.

En la kadro de tiuj ĉi du aranĝoj okazis ankaŭ la printempa renkontiĝo de la membraro de la Tutpollanda Interesiĝ-klubo „Esperanto". Per interesa referaĵo pri „Esperanto en la filatelio" kontribuis s-ro Ryszard Rutkowski. La ĉefa tenoro de la diskuto estis la pluevoluigo de la internaciaj rilatoj. La kluba prezidanto s-ro Marian Kostecki esprimis la deziron pli intime kontakti kun filatelistoj (ankaŭ ne-esperantistoj!) de GDR. En neĉeesto honoris la klubo s-ron Rudolf Burmeister, rekonante la aktivan laboron por la evoluigo de filatelio kaj organiza kunlaboro kun la Tutpollanda Klubo „Esperanto" per speciala diplomo.

Okaze de la solena malfermo de la Esperanto-muzeo en Sopot la filatela klubo „Esperanto" eldonis specialan porokazan poŝtstampon.

La 5-an de aprilo estis prezentata la GDR-kolorfilmo „La GDR en sia 20-a jaro". La ĉ. 70 ĉeestantoj tiel interesiĝis, ke la CLR kaj la PEA (Instruista sekcio) interkonsentis prezentigi la filmon plurloke en Pollando.

Jürgen Hamann

Curt Kessler

Deutsche Redensarten und Redewendungen in Esperanto XIV (Schluß)

voll / eine Hand ... plenmano da; **beide Hände ...** ambaŭmane da; **den Kopf ... haben** havi mult(eg)e da aferoj en la kapo; **j—n nicht für ... nehmen** konsideri iun ne serioza; **aus ...em Halse** plengorĝe; tutforte; **in ...er Arbeit** meze de laboro (de funkciado);
vollbringen / es ist vollbracht la afero estas plenumita (sukcesis);
vollendet / ...e Tatsachen jama fakto; faritaĵo;
vor / ich schätze ... allen mi ŝatas vin pli ol aliajn; **... allem** unue; precipe; ĉefe; **...derhand** provizore;
voraus / im ... antaŭe; anticipe; **... sein vor . . .** antaŭi . . .n; **etw ... haben** havi avantaĝon (privilegion);
Vorbehalt / unter ... rezerve de; kondiĉe;
vorbei / damit ist es jetzt ... tio ne jam eblas;
Vordergrund / in den ... treten aperi en la antaŭo; gravigi; **sich in den ... drängen** antaŭenigi sin;
vorhaben / hast du etw vor? ĉu vi estas libere; ĉu vi intencas ion?;
Vorhand / in ... sitzen esti la unua;
vorhören / man hört die Trompeten vor la trumpetoj dominas (estas tro laŭta);
vorkommen / ist dir schon so etw vorgekommen? ĉu vi jam spertis ion tian?; **es ist nichts besonderes vorgekommen** nenio grava okazis;
vorlieb wollen Sie damit ... nehmen? bonvolu kontentiĝi je . . .;
vorliegen / im ...den Falle ĉikaze;
vorn / von ... herein de komence;
vorhaben / hast du etw vor? ĉu vi estas libera; ĉu vi intencas ion?;
Vorschein / zum ... kommen aperi;
vorsehen / das ist nicht vorgesehen tio ne estis konsiderata (intencata);
Vorsicht / ... ist die Mutter der Weisheit kiu sin gardas, tiu sin savas; dubo gardas kontraŭ risko; singardeman Dio gardas;
Vorsitz / den ... führen prezidi (parlamenton);
Vorsorge / ... treffen antaŭzorgi;
vorstellen / etw ..., was man nicht ist pozi grandmondulon; **vorstellig werden** kun peti sin turni al; **was stellt das Bild vor?** kion prezentas la bildo?
vortragen / auf neue Rechnung ... saldo je nia bono;
Vorteil / j—m einen ... abgewinnen akiri avantaĝon kontraŭ iu;
Vorwissen / ohne mein ... sen ke mi scias;
Vorzug / den ... verdienen meritas esti preferata; estas preferinda al;

W

Waagschale / seinen Einfluß in die ... werfen apogi iun per sia influo; valorigi sian influon;
Wachs / ein Herz wie ... esti karaktero olea; ĝentila kaj trankvila, kun koro el oro; mola kiel vakso;
wachsen / ans Herz ge... parto de mia koro; korligita; **einer Aufgabe ge... sein** esti plentaŭga; esti plenkapabla por tasko; tio tute okupas lian koron; **schön ge...** belstatura; belfigura; beltalia;
Waffe / zu den ...n al la bataliloj! **zu den ... rufen** alarmi; **die ...n strecken;** demeti la batalilojn; kapitulaci; **mit ...ngewalt** per armila forto; per fortoj de la armiloj;
wagen / sich an etw ... provi ion;
Wahl / wer die ... hat die Qual tio estas la embaraso de riĉeco (abundeco); **es bleibt keine ...** ne ekzistas elekto; volu-nevolu; elekto ne ekzistas; **die ... steht dir frei** vi havas liberan elekton;
wahr / nicht ...? ĉu ne? **... machen** realigi; efektivigi; plenumi; **so ... mir Gott helfe!** je graco de Dio!; **so ... ich ein . . . bin** same certe kiel mi estas . . .;
Wahrheit / er hat die ... gepachtet li uzurpis ĉiun veron en la mondo; **die ... ins Gesicht sagen** trafi iun per parolo rekte en la vizaĝon; diri al iu nudan veron; **j—m gehörig die ... sagen** mi lin trafos per parolo rekte en la vizaĝon; diri al iu nudan veron;
Wald / er sieht den ... vor lauter Bäumen nicht li en arbaro aidas kaj arbojn ne vidas; pro multo da arboj li arbaron ne vidas; **wie man in den ... hineinruft . . .** kia sono, tia resono;
walten / seines Amtes ... fari laŭ sia ofico; **das ... die Götter!** la dioj favoru!
wälzen / eine Schuld von sich ... malŝarĝi sin de kulpo;

Wand / j—n an die ... spielen senpovigi iun; **j—n an die ... drücken** alpremi iun al muro; **weiß wie die ...** tolblanka; **in seinen vier Wänden** en sia hejmo; **Wände haben Ohren** muro havas orelojn;
Wandel / Handel und ... komerco kaj trafiko; komercaj interrilatoj;
wann / ... auch immer kiam ajn; **von ... an** die kie;
warm / j—n ... machen hejti al iu la kapon; **etw ... stellen** meti ion ĉe la fajron; **... werden** varmiĝi; **(fig)** vigle interesiĝi; ekflamiĝi;
Warnung / laß dir das zur ... dienen tion (bone) memoru;
warten / warte nur! (Drohung) gardu vin!
was / ... für ein kia; was ist dein Vater? kiun profesion havas . . . **...mich betrifft** koncerno (konsiderinde) min; **... ich denk und tu, trau ich andern zu** ne kredas ŝtelisto, ke honestaj ekzistas; ĉiu mezuras aliajn laŭ sia mezurilo; kion mem mi faras, tion ĉie mi flaras; **... ich nicht weiß, macht mich nicht heiß** kion mi ne scias, tion mi ne envias; se okulo ne vidas, koro ne avidas; antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras; for de l'okuloj, for de la koro; **... ist los?** pri kio estas la afero?; pri kiotemas?
waschen / ich wasche meine Hände in Unschuld ni, senkulpa, lavas miajn manojn;
Wasser / unter ... setzen superakvi; **zu ... werden** (fig) (la projekto) vaniĝis (malsukcesis); **zu ... und zu Lande** akve kaj tere; sur la maro kaj tero; **sein ... lassen** urini; pisi; **Diamant vom reinsten ...** tute klara; **das ist ... auf seine Mühle** tio estas akvo al lia muelilo; li prenos kaj benos; ĝi estas tre ĝusta laŭ lia gusto; **er hat am ... gebaut;** li estas plorema;
wässerig / da wird der Mund ... mia buŝo salivas pro;
Weg / dem steht nichts im ... nenio kontraŭas (ĝenas, malhelpas); **aus dem ... gehen** eviti iun; cedi lokon; **ihm nicht über den ... trauen** ne fidas lin; **sich (j—m) den ... verbauen** bari sian propran (ies) vojon, ĵeti bastonon en la radojn; **auf gütlichem ...** per paca akordiĝo; **j—m im ... sein** ĝeni (malhelpi) iun; **auf dem ... sein zu . . .** esti fariĝanta . . .; **es steht nichts im ..., daß** nenio malhelpas ke, **auf schriftlichem ...** skribe; per skribo; **damit hats gute ...e** tio ne urĝas; tio ne baldaŭ okazos; **schlechte ...strecke** malbona vojparto (vojsekcio);
weg / ganz ... sein esti ravegita; esti preskaŭ konsumita; **das Buch wird ... sein** la libro malestas;
wegsetzen / sich über etw ... ignori ion; devigi sin al forgeso de io;
weh / j—m ... tun kaŭzi doloron al iu; **es tut ...** doloras; mi sentas doloron; **dein Wohl und ...e** via forto kaj farto;
Weihnacht / grüne ..., weiße Ostern varma Kristnasko, malvarma Pasko;
Weile / eine ganze ... longan tempon; **nächtlicher...** nokte;
weis / j—m etw ... machen mistifiki (trompi) iun; kredigi ion al iu;
weisen / etw von der Hand ... rifuzi; **von sich ...** repuŝi iun; malakcepti iun;
Weisheit / Vorsicht ist die Mutter der ... kiu sin gardas, tiu sin savas; **da ist meine ... zu Ende** nun finiĝas mia klereco;
weit / das geht zu ... tio estas troa; **es ... bringen** atingi multon; **wie ... ist es von hier bis A?** kiom estas la distanco de A?; **es ist nicht ... her mit ihm** li ne estas aglo; **bist du so ...?** ĉu vi estas preta? **... und breit** orienta — okcidente; **in die ...e Welt** en la vastan mondon; **das ...e suchen** forkuri; **bei ...em nicht** tute ne; **bei ...em** multe; **von ...em** de malproksimo; **ohne ...eres** sen io plia; senceremonie; **bis auf ...eres** provizore; ĝis alia ordono (avizo); **...ergehen als nötig** transpasi la ncesan; **...gesteckte Ziele** castaj celoj; vastaj aspiroj; **...läufig verwandt** de malproksima parenca; esti nepo de kuzo de onklo de konato; ne estas parencoj per Adamo; li estas preskaŭ mia frato; **er erzählt schrecklich ...schweifig** li rakontas, komencante de Adamo;
Weizen / sein ... blüht fortuno venis al li; li havas sian ŝansegon;
welch / auf ...e Weise? kiel?; kiumaniere?; **aus ...em Grunde?** kial?; pro kio?; **an ...em Orte?** kie?; en kiu loko?; **zu ...er Zeit?** kiam?;
Welt / zur ... bringen naski; **etw aus der ... schaffen** forigi malhelpajon; **wo in aller ...** en kiu angulo (de la mondo); **was in aller ...** kion ajn; **das ist ja nicht die ...** tio ja estas modera (akceptebla) postulo; tio estas farebla; **darüber ist alle ... einig** pri tio ekzistas nur unu opinio; **die große ...** la mondumo; **nicht um alles in der ...** ne pro la tuta mondo; **da hört doch die ...geschichte auf!** jen la supro de l'impertinenteco!; jen la kulmino!
wenden / Geld an etw ... elspezi monon por; **seine Kräfte an etw ...** apliki siajn fortojn por; dediĉi siajn fortojn al;
wenig / **nichts ...er als** (li) tute ne (estas) riĉa; **meine ...keit** nia negrava (modesta) persono;
wenn / ... das ... und das Aber nicht wär . . . se ne estus „se" kaj „tamen", mi al ĉio dirus amen; kiu ne atentas la „se", tiu sentas la „ve": se haroj ne mankus, oni kalvon ne havus; se la ĉielo falus al tero, birdkaptado estus facila afero: se ne la „se" malfeliĉa, mi estus nun homo plej riĉa:
wer / ... kann das sagen? kiu povas antaŭdiri? (antaŭvidi?): pri nenio oni povas ĵuri; ne voku diablon, ĉar li povas aperi; **... weiß?** kiu scias?

Werbetrommel / **die ... rühren** reklami; tamtami;
werden / **wie Sie wissen ...** kiel sendube vi scias; **was willst du ...** kiun profesion vi volas lerni?;
werfen / **sich ... auf** sin ĵeti kontraŭ (malamikoj); entuziasme (fervorege) dediĉi sin al;
Werk / **ans ... gehen** komenci; ekfari; ekagi; **ins ... setzen** ekpraktiki; realigi; **im ... sein** preparigas (grandaj aferoj); **zu ...e gehen** procedi; manipuli;
Wert / **es ist nicht der Mühe ...** ne penindas; **... legen auf** rigardi grave ion;
Wesen / **gezwungenes ...** afekteco; pozeco; **gesetztes ...** kvieta (serioza) maniero; **unruhiges ...** malkvieta karaktero; **sein ... treiben** vagi; vivi; **viel ...s machen von etw** multe brui pri; **nicht viel ...s machen mit j—m** trakti iun sen ceremonioj;
weshalb / **es war sechs Uhr, ... wir aufbrachen** estis la sesa, tial ni foriris;
Weste / **alte ...** sufiĉe konata afero;
wett / **etw ... machen** kompensi;
Wette / **was gilt die ...** per kio la veto?; pri kio(m) ni vetu?; **um die ...** konkure; **ich ... zehn Mark, daß** mi vete elmetas;
Wetter / **alle ...** mil tondroj!; **daß dich das ...** la diablo vin prenu!;
wichtig / **sich ... machen** afekti gravecon; paradi; fanfaroni;
wickeln / **da bist du schief gewickelt** (jen) vi plene eraras;
wider / **das Für und ...** la „por" kaj la „kontraŭ"; **hin und ...** iam kaj iam;
wie / **... alt bist du?** kiun aĝon vi havas?; **... spät ist es?** kioma horo estas?; **... liebenswürdig Sie sind!** kiom vi estas afabla!; **... lange?** dum kiom da tempo?; depost kiam?; **... hoch ist** kiun alton havas; **... teuer ist?** kiun prezon havas?; **... beliebt?** kio(n) vi diris?; **... Sie wünschen!** laŭ via deziro;
wiegen / **sich in den Hüften ...** balanci la koksojn;
Wille / **j—m zu ...n sein** adaptiĝi al ies volo (deziro); **j—m den ...n tun** agi laŭ ies volo; plenumi ies deziron; **aus freiem ...n** laŭ propra volo; **wider ...n** kontraŭvola; **mit ...n** intence; **er soll seinen ...n haben!** lia volo fariĝu;
willfahren / **j—m in etw ...** cedi al ies deziro;
Wind / **der ... geht** vento blovas; **etw in den ... schlagen** ignori ion; **er hängt den Mantel nach dem ...** li scias veturi per ĉiu vento; **von Süd auf West drehender ...** vento turniĝanta de sudo al okcidento; **den ... aus den Segeln nehmen** forpreni al iu la favoran venton (la bonajn ŝancojn); **... bekommen von einer Sache** flari la aferon; **in den ... reden** paroli al la vento; vane prediki; **... machen** (fig) blagi; **wer ... sät, wird Sturm ernten** kiu semas venton, rikoltos fulmotondron; **den ... um die Nase wehen lassen** li havas ankoraŭ la lakton sur la lipoj; li ankoraŭ havas printempon en la kapo; li ĵus elrempis el la ova ŝelo; li ne frapis al si ankoraŭ la kornojn;
Winkel / **...züge machen** artifiki; uzi elturniĝojn; iri kurbajn vojojn;
Wirbel / **mir ist ganz ...ig** mia kapo turniĝas;
wird / **daraus ... nichts** tio ne atingos la celon; tio ne realiĝos; tio ne sukcesos; **dir ..., was du gewünscht** vi ricevas, kion vi deziris; **wie ... das Wetter?** kia estos la vetero?; **morgen ... es ein Jahr, daß** morgaŭ unu jaro estos pasinta, da kiam; **das Kind ... acht Jahre** estas en sia oka jaro; **er ... es vergessen haben** eble (verŝajne) li forgesis tion;
wirklich / **... und wahrhaftig** fakte kaj vere; **sein ...er Vater ist** lia vera patro estas;
wissen / **j—m etw zu ... tun** sciigi ion al iu; sciigi iun pri io; **wider besseres ...** kontraŭ (sia) konvinko; **meines ...s** laŭ mia scio; **daß du es nur weißt** sciu; notu bone; **was ich nicht weiß, macht mich nicht heiß** kion mi ne scias, tion mi ne envias; **ich weiß nun, woran ich bin** mi nun havas certecon; **er weiß aus allem etw zu machen** li eĉ el sablo vipojn tordas; por li eĉ la muso ne estas sen felo; **nicht daß ich wüßte** mi ne kredas; laŭ mia scio ne;
Wirt / **die Rechnung ohne den ... machen** fari kalkulon sen la mastro;
Witz / **das ist eben der ...** jen la malfacilaĵo;
wofür / **... halten Sie mich?** kia vi prenas (kredas, opinias, taksas) min?;
woran / **ich weiß nun ... ich bin** mi nun havas certecon;
Woche / **in die ...n kommen** akuŝiĝi;
wohl / **laß dirs ... gehen!** fartu bone!; **... dem, der** feliĉa li, kiu; **sehr ...!** tre bone!; **lebe ...!** adiaŭ!; **... bekomms!** al via sano; **... oder übel** vole-nevole; **das tut ...** tie estas dolĉa (agrabla); **du würdest ... daran tun** vi agus saĝe;
Wolf / **mit den Wölfen muß man heulen** inter kornikoj ne konvenas predikoj; inter generaloj parolu pri bataloj; en infero loĝante, kun diabloj ne disputu; inter lupoj kriu lupe;
Wolle / **viel Geschrei und wenig ...** bruo potenca, nula esenco; multe da peno, neniom da pano; monto gravediĝis, muso naskiĝis;
wollen / **wir ... gehen** ni iru!; **... Sie so freundlich sein?** bonvolu; **wollte Gott, daß** plaĉu al Dio, ke; **wo will das hinaus?** kien celas tio?; **das will überlegt sein** tion oni devas pripensi; **das will etw heißen** tio ne estas bagatelo (malgravaĵo); **er will es selbst gehört haben** li asertas, mem esti aŭdinta tion; **wie Gott will** laŭ Dia volo;

Wort / **aufs ... gehorchen** obei ĉe eĉ la unua ordono; **nicht ... haben wollen** rifuzi konfirmon; kontesti; **... halten** plenumi sian vorton (promeson); agi laŭ sia promeso; **nicht ... halten** desaponti; **um das ... bitten** peti la parolon; mi deziras paroli; **das ... führen** esti la parolanto (antaŭ la aliaj); **er führt das große ...** li havas la ĉefan voĉon; li donas la tonon; li kondukas la dancojn; **das ... hat ...** la parolon havas ...; **sein ... geben** doni sian vorton (promeson); **j—m das ... erteilen** doni la parolon al iu; **j—m das ... entziehen** retiri la parolon de iu; **j—m ins ... fallen** interrompi iun (ies parolon); **jemand beim ... nehmen** persisti ĉe ies vorto; **dem Klugen genügt ein ...** por sagulo suficas aludo; **viele ...e machen** fari multajn frazojn; **ein ... gab das andere** unu vorto elvokis alian; **nicht zu ...e kommen** ne havi okazon por paroli; **j—m gute ...e geben** peti iun; **weniger ...e, mehr Taten** malpli da vortoj, pli da agoj; **bei diesen ...en** dirante tion; aŭdinte tion;

Wunder / **das ist kein ...** tio ne estas miriga; pri tio na necesas miri; **er glaubt ... was er ist** li kredas sin admirindulo; **es nimmt mich ...** mi miras, ke; **... über ...!** miraklo inter mirakloj;

Wunsch / **das ist ja ein frommer ... (ironisch)** jen pia deziro! jen bela celo por (bela) fabelo;

wünschen / **ich möchte Ihnen alles Gute ...** mi dezirus al vi ĉion bonan; mi dezirus al vi amason da mono kaj titolon de barono; **es steht zu ...** estas dezirinde;

wünschenswert / **es wäre ... zu hören** mi dezirus aŭdi, ĉu;

Würde / **das ist unter meiner ...** tio ofendus mian dignon;

Wurf / **das war ein guter ...** tio estas (bona) trafo; **alles auf einen ... setzen** ĉion dependigi de unu ŝanco; hazardlude; **j—m in den ... kommen** hazarde; malbonŝance renkonti iun; **der große ...** genia solvo (eltrovo); geniaĵo;

Würfel / **die ... sind gefallen** la ĵeto estas farita; la loto estas tirita;

Wurm / **er krümmt (windet) sich wie ein ...** li batadas kiel fiŝo kontraŭ glacio; li baraktas kiel fiŝo ekstar la akvo; li turniĝadas kiel serpento; li kuradas kiel venenita muso; li kurbiĝadas kiel diablo en akvo benita; **j—m die Würmer aus der Nase ziehen** ellogi ies sekretojn;

Wurst / **das ist mir alles ...** tio estas negrava; tio neniel interesas min; egala por mi; tio ne tuŝas min; **mit der ... nach dem Schinken werfen** leki la manon, sed celi la panon; ne ekzistas kareso sen intereso; selante ĉevalon, li ĝin karesas; doni ovon por ricevi bovon; bovo prenita, koko donita kaj — kvita;

Wurzel / **die zweite ... ziehen (math)** tiri la kvadratan radikon; **... schlagen** enradikiĝi;

Wüste / **jemand in die ... schicken** forsendi iun senhonore; ekzili iun; anatemi iun;

Wut / **an jemand seine ... auslassen** elverŝi sur iun sian koleron;

X

X / **ein Herr ... kam zu mir** sinjoro ajnulo; **ein ... für ein u vormachen** ĵeti sablon en ies okulojn

Z

Zahl / **um die ... voll zu machen** pro kompletigo; por kompletigi;

zählen / **auf jemand ...** kalkuli je iu; **jemand zu seinen Freunden ...** rigardi iun unu el la amikoj; **dieser Stich zählt nicht** ne valoras; ne validas; **sein Vermögen zählt nach Millionen** sumiĝas je milionoj;

Zahn / **jemand auf den ... fühlen** palpi al iu la pulson; sondi iun;

Zähne / **jemand durch die ... ziehen** preni iun sur la dentojn; **bis an die ... bewaffnet** armita de l'kapo ĝis la piedo; **zeig ihm die ...!** montradu al li la dentojn!; **er zieht alles an den ...n herbei** kio mem ne venas, li per la dentoj ĝin prenas;

zappelig / **er ist furchtbar ...** li estas vera hidrargo; li estas flugema kiel vento;

zappeln / **jemand ... lassen** lasi iun en embaraso (timo);

Zauber / **seine ...kreise ziehen** fari siajn magiajn rondojn;

Zaun / **vom ... brechen** estigi; ekigi; ekflamigi; malkateni; **einen Streit vom ... brechen** pretekste (senkaŭze) ekdisputi;

Zeche / **was macht meine ...?** kiom mi pagos?;

Zehe / **auf den ...n gehen** iri piedfingre;

zehn / **die ... Gebote** dekalogo;

zehren / **er zehrt von seinem Fett** li konsumas sian antaŭan grason;

zeichnen / **fünfhundert Mark ...** subskribi por 500 markojn;

Zeit / **die gute alte ...** la bona malnova tempo; **alles zu seiner ...** por ĉiu faro estas horo; **es ist an der ...** estas (nun) tempo; estas (nun) la ĝusta momento; **auf kurze ...** je mallonga tempo; **in kurzer ...** post mallonge; **mit der ...** iom post iom; **seit der ...** de (post) tiam; **von ... zu ...** iam kaj iam; **zu keiner ...** neniam; **zu gleicher ...** samtempe; **... meines Lebens** dum mia (tuta) vivo; **es ist höchste ...** estas plej urĝa tempo; **das hat noch ...** tio ne urĝas; **gerade**

zur rechten ...! en bona horo!; **andere ...en, andere Sitten** aliaj tempoj, aliaj moroj; **bei ...en** baldaŭ; **für alle ...en** por ĉiam; por eterne; **seit undenklichen ...en** depost tempo nememorebla; **das ...liche segnen** diri „adiaŭ" al la mondo surtera; fari sian lastan translokiĝon; **seiner ...** siatempe;

Zeug / das ... haben zu ... havi talenton por; esti kapabla al; taŭgi por; **was das ... hält** furioze; kiel eble plej rapide; **sich ins ... legen** labori (agi, klopodi) laŭpove (fervorege);

ziehen / nach sich ... sekvigi; **in Betracht ...** konsideri; **auf Flaschen ...** enboteligi (vinon); **in die Länge ...** prokrasti; longedaŭrigi; **zu Rate ...** konsulti iun; **Vergleiche ...** kompari; **in Zweifel ...** pridubi ion; **den Tee ... lassen** infuzi teon; **Kinder in Ziehe nehmen** alpreni infanojn por eduki;

Ziel / durchs ... gehen trakuri (trairi, traveturi) la cellinion; **.. und Zweck** celo kaj senco; **weitgestecktes ...** ampleksa celo (aspiro); **das ... verfehlen** maltrafi la celon; **ein ... setzen** meti (fiksi) limon al io; **drei Monate ...** pagenda post tri monatoj;

Ziffer / sich be...n auf nombri; esti (nombre); konsistige; sumiĝi je; kosti;

Zittern / ein ... überfällt uns tremo atakas nin; **... wie Espenlaub** tremi kiel aŭtuna folio;

Zorn / an j—m seinen ... auslassen elversi sur iun sian koleron;

zu / 3:2 gewinnen venki per 3 al 2 (goloj, poentoj); **nach Dresden zu** en la direkto al Dresden; **Glück ...!** sukceson!; multan feliĉon!; **von Tag ... Tag** de tago al tago; **dieser Wein ist nicht ... trinken ...** ne trinkebla;

zucken / er hat nicht gezuckt li tute ne moviĝis; **es zuckt mir in den Fingern** mia mano jukas;

Zucker / seinem Affen ... geben dorloti sian ĉevaleton;

Zug / im ... der Zeit tendenco de l' (de nia) epoko; **zum ... kommen** esti la vico de (io); efiki plene; veni al plena laborado; **... um ...** parton post parto; paŝon post paŝo; **der ... der Zeit** tendenco (inklino) de l'epoko; **die Sache ist gut im ...e** la afero bone marŝas; la afero vigle progresas; **mit einem ...e austrinken** eltrinki per unu tiro; **im ...e von** en (laŭ) la evoluo de; **in langen Zügen rauchen** fumi per longaj tiroj; **in den letzten Zügen liegen** agonii; **in großen Zügen** laŭ grandaj trajtoj; maldetale;

zugehen / wie ging es zu, daß kiel povis okazi, ke; **das geht nicht mit rechten Dingen zu** tio estas stranga (mistera) afero;

Zügel / die ... schießen lassen malbridi; lasi liberan kuron;

zugreifen / bitte ...! bonvolu preni!;

zukommen / j—m etw ... lassen havigi ion al iu; **das kommt dir nicht zu** tio ne decas por vi; por tio vi ne havas rajton;

Zulauf / ... haben (tiu kuracisto) estas multe konsultata;

zunehmen / fünf Pfund (an Gewicht) ... plipeziĝi je kvin funtoj;

Zunge / eine lose ... haben li ne serĉas vorton en la poŝo; **eine feine ... haben** havi subtilan guston; **er redet mit zwei ...n** li havas ĉiun horon alian moron; el la sama buŝo li blovas varmon kaj malvarmon;

vorsagen / j—m etw ... endiri ion en iun; subdiri; suflori ion al iu; modelo diri;

zur / ... Dsiposition en rezervo; **... Hälfte** duone; **... Sache!** al la temo!; al la afero!; **... Sprache bringen** priparolatigi; **... Strafe** pune; kiel puno; **... Welt kommen** naskiĝi; **... Zeit** nun (tempe);

zurecht / j—m den Kopf ...setzen (rücken) rekonduki iun al prudento;

Zureden / da nützt kein ... eĉ per dolĉa kuko vi min ne allogos; vane vi tentas, mi ne konsentas;

zurückführen / die Wirkung auf die Ursache ... klarigi la efikon el la kaŭzo; **die Verluste auf ein geringes Maß ...** fari la perdojn kiel eble plej malgrandaj; **auf seine Bestandteile ...** analizi;

zusammen / das hängt damit ..., daß tio sekvas el tio, ke; **damit hängt ..., daß** el tio sekvas, ke; kun tio estas ligita la fakto, ke;

Zusammenhang / im ... mit en interligo; en rilator kun (el); **in diesem ...** en ĉitiu interrilato;

zusehen / da sieh du zu! tio estas via afero!;

zutrauen / j—m etw ... opinii iun kapabla por; **ich traue ihm nicht viel zu** mi ne havas altan opinion pri li;

zuvor / es j—m ... tun superi iun;

Zwang / sich ... antun sin devigi al;

Zweck / ... und Ziel senco kaj celo; **der ... meines Briefes ist** la celo de mia letero estas;

zwei / alle ... ambaŭ; **... geben ein Paar** du botoj faras paron; bela paro por altaro; **... von uns** du el ni; **einer von euch ...en** unu de (el) vi du; **das ist ...erlei** tio estas diferenca; tio estas du apartaj aferoj; **...gliedrige Größe** binomo;

Zweifel / im ... sein en (kazo de) dubo; **... setzen in** pridubi ion; **außer ... setzen** meti ekster dubon; **außer allem ...** ekster ĉia dubleblo; **in j—m ... wachrufen** dubigi iun;

Zweig / auf keinen grünen ... kommen resti sen prospero kaj espero;

Zweikampf / zum ... fordern sendi kartelon;

Nikola Aleksiev, Sofia

Panoramo de la Esperanta-movado en Bulgario

Dum 1971 la bulgaraj esperantistoj atingis novajn sukcesojn. En multaj urboj kaj vilaĝoj estis organizitaj kursoj de Esperanto por lernantoj kaj civitanoj precipe el inter fakuloj. En la Superan Pedagogian Instituton de Šumen Esperanto estis enkondukita kiel fakultativa studobjekto. Tio estas la kvara supera lernejo en nia lando, kie oni instruas fakultative la Internacian Lingvon.

La Distrikta Komitato de Bulgara E-Asocio en Smoljan organizis la Kvarajn Internaciajn E-Kursojn.

Sub la egido de la Instruista Sekcio de BEA plene sukcesis la porinstruistaj E-kursoj en Burgas. Inter la instruantoj tie estis ankaŭ d-ro Szerdaheliy (Serdahej), estro de la Esperanto-katedro el la Budapeŝta Universitato, kaj Helmut Sonnabend el Germana Federacia Respubliko, vicprezidanto de la Internacia Ligo de Instruistoj-Esperantistoj (ILEI). Estis eldonitaj lernolibro de Esperanto por progresintoj de Henrik Sepik kaj metodika gvidlibro de d-ro Szerdaheliy. Je nuntempa scienca kaj metodika nivelo estis ellaborita programo por instruado de Esperanto en la lernejoj laŭ la postuloj de Ministerio de Popola Instruado. Laŭ tiuj postuloj speciala aŭtora kolektivo preparos ankaŭ lernolibron por junpioniroj.

En urbo Jambol okazis la Deka Nacia Festivalo de Junaj Esperantistoj, dediĉita al la Deka Kongreso de Bulgara Komunista Partio. Konkuris por plej altaj atingaĵoj pli ol mil junaj amatoroj el ĉiuj ĝenroj de la belarto. La festivalo estis je alta politika kaj arta nivelo kaj vera festo por la Esperanto-junularo el la tuta lando. Speciale entuziasma estis la mitingo kune kun la junularo de Jambol, dediĉita al la junularo batalo kontraŭ la imperiismo.

En la historia urbo Karlovo estis organizita internacia junulara Esperanto-seminario je temo „La ideologio de Vasil Levski, la verkaro de Hristo Botev kaj Ivan Vazov". Prof. Ivan Unĝiev kaj la literatoro-esperantisto Asen Grigorov kompetente kaj interese priskribis la aferon de l'titanoj de niaj naciaj Renesanco kaj literaturo Levski, Botev kaj Vazov. Oni vizitis iliajn naskiĝdomojn transformiĝintajn en muzeojn por nia popolo.

En la ĉefurbo okazis granda publika kunveno helpe al la popoloj de Hindoĉinio kaj defende al la juna amerika patriotino Angela Davis. Ĝi estis organizita de la bulgara sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), la Nacia Komitato por Defendo de la Paco kaj la Urba Komitato de Patrolanda Fronto. La CK de BEA kunvokis du plenkunsidojn, kiuj fiksis la taskojn de la esperantistoj lige kun la decidoj de la Deka Kongreso de BKP. Tio donis pli grandan klarecon kaj novan puŝon en la preparo de la 38a Nacia Esperanto-Kongreso, kiu okazis komence de julio 1972 en urbo Smoljan.

Vigla estis la agado de la bulgaraj esperantistoj ankaŭ sur la internacia Esperanto-areno.

Grupo de bulgaraj esperantistoj partoprenis la laboron de la 56a Universala Kongreso de Esperanto en Londono. Aparte fortan impreson lasis ĉe la esperantistoj el kvin kontinentoj la altnivela ludo de la Bulgara Esperanto-Teatro, konsistanta el artistoj el la Nacia, Junulara kaj Satira Teatroj.

Niaj junaj esperantistoj partoprenis la konoreson de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo (TEJO) en Edinburgo, Skotlando.

La bulgaraj esperantistoj estis invititaj kaj partoprenis E-konferencon en Ĉeĥoslovakio kaj Rumanio, ankaŭ la renkontiĝon de reprezentantoj de la E-movadoj en Berlino, GDR. En la MEM-kunveno en Londono bulgaraj esperantistoj ludis aktivan kaj gvidan rolon.

Niaj reprezentantoj partoprenis la kongreson de la Internacia Federacio de Esperantistoj Fervojistoj en urbo Maribor, Jugoslavio, ankaŭ la regionan Konferencon de Instruistoj-Esperantistoj el la Balkan-Danuba kaj Adriatika Basenoj en la sama urbo.

En la Asembleo de la Tutmonda Packonsilantaro, okazinta en Budapeŝto, partoprenis ankaŭ reprezentanto de MEM el Bulgario, kiu estis elektita en la Tutmonda Packonsilantaro. Tio estas granda atento de la tutmonda movado de pacbatalantoj al la agado de MEM kaj de la bulgara E-movado.

Ni notis nur kelkajn el la plej gravaj manifestiĝoj de la bulgaraj esperantistoj en 1971. Ili estas valora kontribuo al la disvolviĝo de la bulgara kaj internacia Esperanto-movado kaj garantio por sukcesa 38a Nacia Kongreso de la Esperantistoj en Smoljan.

Parolado, farita de la prezidanto de BEA Nikola Aleksiev antaŭ Radio Sofia.

Sensacia nova medicina esploro en Taŝkento

resumo de artikolo

En Taŝkento, ĉefurbo de Soveta Uzbekio, uzbeka sciencisto, medicinista prof. d-ro Adil Ŝaripoviĉ Ŝakirov, esploris dum 20 jaroj laŭ modernaj sciencaj metodoj mondfaman balzamon, mumijao, kiun popolaj kuracistoj uzis dum jarcentoj en multaj landoj. Oni trovas la mumijaon en montaj kavernoj sur sudaj, prilumitaj deklivoj, sur la alteco inter 1500 kaj 3000 m. En formo de densa substanco ĝi elgutas el rokaj fendoj kaj solidiĝas sur la ŝtona surfaco. La origino de la mumijao ankoraŭ ne estas science klarigita.

Miloj da plej diversaj eksperimentoj montris, ke la mumijao:

1) plimallongigas je 15 (!) tagoj la kunkreskiĝon de la rompitaj ostoj; 2) plibonigas la funkciojn de la medolo, renoj, hepato kaj kelkaj endokrinaj glandoj; (ankaŭ seksaj); 3) aktivigas la simpatian nervan sistemon; 4) plialtigas la substancan metabolon; 5) mortigas kelkajn specojn de pusigaj mikroboj al kiuj ne efikas penicilino; 6) influas kontraŭinflame; 7) plialtigas la rezistokapablon en la organismo kontraŭ la subnorma enhavo de oksigeno en la enspirata aero; 8) plibonigas la staton ĉe la radia malsano;

La eksperimentoj pruvis, ke la mumijao ne estas toksa, t. e. ne entenas venenajn substancojn.

Kiu deziros ricevi detalajn informojn pri la temo, tiu skribu al la sciencisto, en ESPERANTO, laŭ jena adreso: Sovetunio, Uzbeka SSR, TAŜKENTO, Glavpoĉtamt, ul. Kablukova 5, Taŝkenta Scienc-Esplora Instituto por Traŭmologio kaj Ortopedio, al ĉefo de Scienca Fako, prof. d-ro Adil Ŝakirov.

Romano Grinŝpan.
Taŝkento, Sovetunio

НА ЯЗЫКЕ ЭСПЕРАНТО

В дом Сергея Александровича Измайлова почтальон часто приносит письма с иностранными штемпелями и марками. Измайлов переписывается с эсперантистами многих стран мира.

Сорок пять лет назад началась его дружеская переписка с немецким коммунистом Отто Бесслером. В те годы Бесслер был членом Союза красных фронтовиков Западной Саксонии, увлекся эсперанто и стал одним из руководителей международной организации рабочих-эсперантистов. В августе 1926 года Отто приезжал в Ленинград на международный конгресс рабочих эсперантистов. Там красные фронтовики из Саксонии обменялись знаменами со смоленскими курсантами школы имени Мясникова. В следующем году Бесслер побывал в Смоленске. Тогда и состоялось знакомство курсанта Сергея Измайлова с саксонским коммунистом. Переписка друзей прервалась, когда к власти в Германии пришли фашисты.

В 1956 году С. Измайлов в одной из газет прочитал о том, что в Лейпциге создан музей ленинской «Искры» и в числе его инициаторов — Отто Бесслер. На одном из стендов музея было выставлено знамя смоленских курсантов, сбережённое немецкими патриотами.

Переписка между друзьями возобновилась. 17 января 1972 года Отто Бесслеру исполнилось 75 лет. Среди других поздравлений он получил и письмо из Великих Лук.

В. БРИТИКОВА.

ВЕЛИКИЕ ЛУКИ.

„Iswestija“ vom 16. 2. 72, Nr. 39 (16 967)
INFORMATION aus der Welt des Interessanten

Leser teilen mit:

In der Sprache Esperanto

In das Haus von Sergej Alexandrowitsch Izmailow bringt der Postbote oft Briefe mit ausländischen Stempeln und Marken. Izmailow korrespondiert mit Esperantisten vieler Länder der Erde.

Vor 45 Jahren begann seine freundschaftliche Korrespondenz mit dem deutschen Kommunisten Otto Bäßler. In jenen Jahren war Bäßler Mitglied der Roten Frontkämpfer in Westsachsen, begeisterte sich für Esperanto und wurde einer der Führer der internationalen Organisation der Arbeiter-Esperantisten. Im August 1926 fuhr Otto nach Leningrad zum internationalen Kongreß der Arbeiter-Esperantisten. Dort tauschten die Rotfrontkämpfer aus Sachsen Fahnen mit den Smolensker Schülern der Schule Mjasnikow. Im folgenden Jahr weilte Bäßler in Smolensk. Damals entstand auch die Bekanntschaft zwischen Sergej Izmailow und dem sächsischen Kommunisten. Die Korrespondenz der Freunde brach ab, als in Deutschland die Faschisten zur Macht kamen. 1956 las S. Izmailow in einer der Zeitungen davon, daß in Leipzig ein Museum für Lenins „Iskra“ geschaffen wurde und einer seiner Initiatoren * Otto Bäßler sei. Auf einem der Ständer des Museums wurde die Fahne der ehemaligen Smolensker Schüler ausgestellt, die von den deutschen Patrioten aufbewahrt worden war. Die Korrespondenz zwischen den Freunden begann nun von neuem. Am 17. Januar 1972 vollendete Otto Bäßler das 75. Lebensjahr. Unter anderen Gückwünschen erhielt er auch einen Brief aus Welikie Luki.

W. Britikowa, Welikie Luki

* richtig: Mitarbeiter. Die Red.

Georgi Dimitrov antaŭ la faŝisma tribunalo:

„Estas vere, ke mi estas bolŝevisto, proleta revoluciulo. Estas vera ankaŭ tio, ke, kiel membro de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj membro de la Plenumkomitato de la Komunista Internacio, mi estas respondeca kaj gvidanta aganto. Sed ĝuste pro tio mi estas nek terorista aventuristo, nek komplotanta puĉisto kaj bruligisto ... Mi efektive estas entuziasma adepto kaj adoranto de la Komunista Partio de Sovet-Unio, ĉar tiu-ĉi partio regas la plej grandan landon en la mondo ... kaj sukcesplene konstruas la socialismon.“

Dum la jarŝanĝo en Pécs

Kiu foje estis kiel gasto en Hungario, tiu ĉiam denove sentas sin allogata al tiu belega kaj gastema lando. Tial mi ankaŭ goje akceptis la inviton, pasigi la tempon de la 30-a de decembro '71 ĝis la 3-a de januaro '72 en internacia rondo en Pécs. La organiza komitato de la 2-a I(internacia) S(ilvestra) E(sperantista) R(enkontiĝo), kiun mi jam konis de la Abaliget-a renkontiĝo en 1971, estis garantio por interesaj kaj travivaĵplenaj tagoj.

Tre domaĝe estis, ke preskaŭ je la sama tempo okazis en du diversaj urboj renkontiĝoj: ISER en Pécs kaj V(intra) E(sperantista) F(erio) en Budapeŝto. Certe pli avantaĝe kaj pli alloge estus organizi nur unu renkontiĝon.

En Pécs partoprenis geamikoj el Jugoslavio, el ČSSR, el Danio, el Popola Respubliko Pollando kaj el GDR. Kvankam la programo estis tre multflanka, restis sufiĉe da tempo por promeni, admiri la urbon kaj ties vidindaĵojn (ekz. la famaj preĝejoj aŭ la monumentoj), elprovi la bongustan vinon hungaran kaj (sukcese!) traserĉi la librovendejojn pri Esperanto-literaturo. Kulminoj estis la prelego de s-ro prof. Jaki el Budapeŝto pri la hungara literatura evoluo, la vizito de la Zsolnay-muzeo — ceramik-muzeo unika en Eŭropo — kaj renkontiĝoj kun la lokaj geesperantistoj en la „Kelamiko-klubo", kie i. a. s-ro Gerd Fügert el Dresdeno prezentis siajn diapozitivojn pri 4-a IREN (Abaliget '71) kaj Dresdeno, kie ni kantis, interbabilis kaj enamikiĝis.

Kompreneble ni ankaŭ havis „Grandan Internacian Silvestran Esperantistan Balon", kiu ne finiĝis antaŭ matengriziĝo.

Sed la plej bela estis kaj restas la multaj amikaj interparoloj kun novaj kaj malnovaj konatoj.

Cetere: al Hungario oni povas vojaĝi ankaŭ somere — ekz. al 5-a IREN en Abaliget apud Pécs. Ĉu tio ne estus ferioebleco por vi?

Joťha

Labortaĉmento „Esperanto 71"

De 10 de julio ĝis 25-a de aŭgusto 1971 en kolektiva terkultura mastrumo „Svetlaja Polana" de Novosibirska provinco (80 km de la urbo Novosibirsk) esperantistoj el diversaj lokoj de Sovetunio organizis labortaĉmenton. Kunveturis 63 gejunuloj el 11 urboj. Litovion reprezentis klajpedanoj kaj vilnjusanoj. La taĉmento konstruis eksperimentan ejon por bestbredado. La laboro estis bone pagata (mi mem, ekzemple, perlaboris 139 rublojn); vojaĝo — senpaga. Ni laboris en du ŝanĝoj. Post vespermanĝo sekvis ludoj, muziko, lernado de la internacia lingvo, kiu estis „oficiala" en la taĉmento. Nia laboro estis filmita kaj demonstrita en televide.

E. Eselinas

(El Horizonto de Soveta Litovio 3/71)

Foira renkontiĝvespero

Laŭtradicie dum printempa foiro en Leipzig okazis renkontiĝo kun eksterurbaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Ĉeestis ĉa. 70 personoj, inter ili 4 polinoj kaj unu samideano el Ĉeĥoslovakio krom multaj eksterurbaj geesperantistoj el G.D.R. De loĝkvartala instrumenta ĥoro estis prezentita unue popolkantoj german- kaj esperantlingve. Esperantistino, al tiu ĥoro apartenanta, salutis la ĉeestantojn.

Post paŭzo parolis gesamideanoj Boas, Stollberg kaj Greif interŝanĝe pri unua partopreno de Sovetunio ĉe Leipziga foiro en la jaro 1922 kaj la sekvantajn foirojn. Ellaboris la tekston amiko Otto Bäßler.

Poste samideano Viala el Podebrady — ČSSR salutis en la nomo de la tiea vigla grupo kaj parolis pri la Esperantomovado en ČSSR. La ĉeestantaj esperantistinoj el Bielsko-Biala (Pollando) salutis en la nomo de ilia grupo.

Sekvis libera konversacio inter la ĉeestantoj. Malnovaj amikoj interrilatis, sed ankaŭ multaj partoprenantoj dum tiu vespero trovis novajn amikecojn. *Elsa Gruhle*

Svedaj fervojistoj en Saßnitz

Antaŭ kelka tempo anoj de la Sveda Esperanta Fervojista Asocio uzis la pramon de Trelleborg ĝis Saßnitz kiel kunvenejo kaj restis unu tagon en Saßnitz.

Laŭ la deziroj de la 25 svedaj esperantistoj, lokomotivistoj, veturdejorestroj kaj aliaj fakkolegoj kun iliaj edzinoj, s-ro Hans Diedrich faris mallongan diapositivan fakprelegon pri la vivo, la laboro kaj la socia pozicio de la fervojistoj en GDR. Kun la subteno de la fervoja direkcio Schwerin, oni donacis al la svedaj kolegoj, kiel memorajon la fervojan jarlibron de GDR kun mallonga resumo de la enhavo en Esperanto. S-ro Plate el Rostock prelegis pri la „Semajno de la Balta Maro".

Dum la vespero estis agrabla kunestado kun danco kaj mallongaj konversacioj pri diversaj problemoj de la vivo en ambaŭ landoj kaj fervojoj. Cele al tio ankaŭ servis interesa diskutforumo. Oni povas konstati, ke la svedaj amikoj tre forte interesiĝas pri la labor- kaj vivkondiĉoj en GDR kaj serĉas kontaktojn kun esperantistaj fervojistoj.

Certe revido okazos en la kadro de la fama „Semajno de la Balta Maro" okazanta ĉiujare dem julio den Rostock kaj aliaj nordaj urboj de GDR. *H. Diedrich*

Ziemeri — Karl-Marx-Stadt

En la lavia urbo Ziemeri la tiea lernejo lastjare festis sian 100-jaran ekziston. Certe tiuj cent jaroj havis tre diversan kaj multfacan historian pasinton. Sed gravas la hodiaŭo kaj la hodiaŭo de tiu lernejo estas i. a. karakterizata de firma amikeco inter la lernejo Esperanto-rondeto „Fajrero" kaj ĝia „patrono" el GDR, Alfred Müller el Karl-Marx-Stadt. Lastjare la esperantistoj de Ziemeri aranĝis en sia lernejo tre bonan ekspozicion pri la latvia-germana amikeco. Kaj longa letero de Alfred Müller el Karl-Marx-Stadt, aperinta en la loka gazeto „Oktobra Karogs" („Standardo de Oktobro") n-ro 46 (628), de la 20. 4. 1971, estis bona kontribuo al la plifortigo de tiu amikeco.
Ĝi daŭru kaj evoluu!

Kreis Zittau

Werner Haupt aus Karl-Marx-Stadt hielt am 12. April 1972 in Zittau einen öffentlichen Vortrag mit Farbdias über „Reise durch sechs Länder". Dabei berichtete er in Wort und Bild auch über zwei Esperanto-Ferienlager in den Sudeten und Rhodopen. Mit dieser sehr geschickten Verbindung eines allgemein öffentlichen Vortrages im Zittauer Kulturzentrum, Äußere Weberstraße, mit unseren Anliegen wurde eine gute Propaganda erreicht, zumal auch im Zeitungsinserat und in den öffentlichen Plakataushängen diese Esperanto-Ferienlager miterwähnt wurden. Von dieser Möglichkeit, bei einem solchen Reisebericht zugleich auf die Vorzüge des Esperanto im Dienste des Tourismus hinzuweisen, sollte auch anderenorts Gebrauch gemacht werden.

Oskar Walter

Seifhennersdorf

La 12-an de aprilo okazigis la fervora nova esperantoamiko Paul Kirsch, Seifhennersdorf, subdistrikto Zittau, per modela juneca elano provizoran komencantan kurson. Li kalkulas, ke la 12 partoprenantoj jam ĝis aŭtuno kapablas komenci ne nur eksterlandan korespondadon, sed eĉ kuraĝas, Esperanton praktike apliki okaze german-ĉeha Esperantista Renkontiĝo, kiun li en la aŭfuno intencas aranĝi en Seifhennersdorf. Kiel limtransirejo al Ĉehoslovakio tiu loko precipe estas konvena por tia aranĝo.
En la sekvontjara feriotempo li kun siaj adeptoj jam volas eluzi la multflankajn eblecojn partopreni eksterlandajn feriejojn kaj esperantistajn renkontiĝojn en la socialistaj fratolandoj.
En la sekvonta aŭtuno li krome intencas okazigi pli grandan varbarangon kun Esperanto-ekspozicio por starti novan komencantan kurson.

Oskar Walter

Grenztreffen

Am 18. und 19. November 1972 führt die Esperantogruppe des DKB in Zittau ein Esperantotreffen in Seifhennersdorf durch, an dem auch Esperantisten aus der ČSSR und Polen teilnehmen werden. Die Anmeldung für die Teilnahme muß bis zum 31. 7. 1972 erfolgen. Der Betrag für die gewünschte Übernachtung bzw. Verpflegung ist bis zum 31. 8. 1972 an Oskar Walter, 88 Zittau, Albertstraße 14, zu überweisen. — (Übernachtung: 8,— M, wenn gewünscht im gleichen Hotel Frühstück 4,— M., ein komplettes Menü 7—8 M., Abendbrot 5,— M.

Intervjuo en GDR-radio

Sabate la 11an de marto 1972 kaj dimanĉe la 12an estis dissendita en la GDR-radiostacio „Voĉo de GDR" intervjueto kun D. Blanke, la sekretario de CLR. Temis pri esperantlingvaj respondoj je germanlingvaj demandoj, en kadro de enigma programero. La aŭskultantoj havis la taskon diveni, en kiu lingvo oni parolis. Post tri semajnoj la radio-stacio solvis la premienigmon kaj lige kun tio informis pri Esperanto.

Post longa malsano mortis la 12-an de marto 1972 nia kunlaboranto **Curt Kessler**
el Dresden-Klotzsche.
Ni perdas en li tre spertan esperantiston kaj honormemoros lin.

CLR, DLR
redakcio „der esperantist"

XIII BET

La 6–16 de aŭgusto 1971 en pitoreska nordlatvia urbo Smiltene okazis XIII Baltia Esperanto Tendaro. Al la tendaro venis esperantistoj ne nur el Baltiaj respublikoj, sed ankaŭ el multaj aliaj lokoj de Sovetunio (eĉ el Meza Azio). Partoprenis 253 personoj. Plejmulto de partoprenanto, loĝis en komunloĝejo de loka teknikumo, aliaj en tendoj ekster la urbo, ĉe rivero, en sino de naturo.

En la tendaron esperantistoj venis ne nur ripozi kaj ĝui pri belega ĉirkaŭa naturo, sed ankaŭ pritrakti siajn komunajn aferojn, intersanĝi sperton, renkontiĝi kaj fari novajn kontaktojn.

La plej gravaj aranĝoj estis: somera universitato, gvidata de la verkistino N. Andrianova, libera tribuno, du kursoj (komenca kaj perfektiĝa), vesperfestoj-koncertoj de apartaj popoloj, ekskursoj.

El la prelegoj de la somera universitato precipe notindaj estas tiuj de doc. S. Podkaminer „Socialismo kaj Esperanto", de N. Andrianova „Problemoj de Esperanto-stilo", de doc. B. Tokarev „Humanismo en Esperanta literaturo".

Funkciis sekcioj de pedagogoj, ĵurnalistoj, verkistoj, tradukistoj, naturdefendantoj, gimnastikuloj. Pedagoga sekcio okupiĝis pri plua preparado de Esperanto instruistoj, pri preparo kaj eldono de lernolibroj. Verkistoj legis siajn verkojn, diskutis pri problemoj de stilo kaj formo.

Grandan intereson vekis bulteno de naturamantoj de Tallinn pri planata en julio de 1972 en Estonio kunveturo de naturamikoj — esperantistoj. Organiza komitato aranĝis du ekspoziciojn: Esperanto-eldonaĵoj kaj infandesegnaĵoj el la tuta mondo. La du ekspoziciojn kompletigis fotostandoj pri agado de esperantistoj en Baltiaj respublikoj („Laboro de tendaroj, kluboj kaj rondetoj"), fotokonkurso, kiun gajnis A. Strautmanis kaj J. Kalninŝ.

Lokaj agantoj de klerigado kaj lernantoj precipe interesiĝis pri la infandesegna ekspozicio el la tuta mondo, enhavanta desegnaĵojn de 52 popoloj el ĉiuj kvin kontinentoj. *(El Horizonto de Soveta Litovio" 3/71)*

ĈE VASTA DNIPRO

La tagoj apud Kievo ekde 29 de julio ĝis 6 de aŭgusto 1971 pasis tre rapide kaj riĉenhave. Tio okazis SEJT-13 (Somera Esperanta Junulara Tendaro). Nia familio estis tre granda — 320 partoprenantoj, inter ili 30 eksterlandanoj. Ĉe Dnipro etendiĝis horizontoj de amikeco. Venis amikoj el batalanta Vjetnamio (3), el frataj Bulgario (3), Pollando (9), Hungario (15) kaj el preskaŭ ĉiuj grandaj urboj de Sovetunio.

La tendara programo proponis multe da diversaj aranĝoj. Plej mencindaj estas la pedagogia seminario, scienca seminario, kursoj por komencantoj, daŭriga kurso, Neptuna festo, klubo de gajuloj kaj sprituloj.

La prelegoj dum la pedagogia seminario temis pri gramatiko de Esperanto, interlingvistiko, historio de Esperanto-movado, Esperanto-literaturo, metodiko de instruado. Prelegis altkvalifikitaj specialistoj: docento B. Kolker el Ufa, docento B. Tokarev el Moskvo, aspiranto K. Velkov el Sofio. Post la prelegoj sekvis ekzamenoj: 30 personoj ricevis atestojn pri instrukapablo.

EL HUNGARIO

Budapeŝtaj vintro-ferioj fine de 1971

Kvin esperantistoj de DDR partoprenis la I-an Vintran Esperantistan Ferion, okazintan en Budapeŝto de la 28-a de decembro 1971 ĝis la 2-a januaro 1972, aranĝita de la BUDAPEŜTA 1-a TERITORIA KOMITATO de HUNGARA-ESPERANTO-ASOCIO.

Vespere, la 28. 12. 71, la anoj de la organiza komitato salutis la gastojn en la salonoj de la Resoracio Esperanto, kie ni ankaŭ manĝis.

La sekvantajn tagojn ni vizitis per aŭtobuso, per metro aŭ piede la vidindaĵojn de Budapeŝto, i. a. la centron de la urbo, la fortikaĵon, la „Sankta Stefano"-Bazilikon, Nacian Galerion. En la Ŝtata Operejo ni vidis du baletojn kaj gajan operon. La trian tagon glaso da varma vino stimulis la ekskursantojn al veturado per kabloveturilo super la neĝkovrita arbaro ĝis la rigardoturo de Johano Monto. Poste, promenante trans la arbaro, ni veturis per la Pionira Fervojo. Ĉe la finstacidomo ni manĝis en la fama restoracio „Balazs" paprikan gulaŝon en kaldrono kaj trinkis vinon. La „Silvestra tago", vespere, la gastoj deklamis kaj popolkantis esperante kaj dancis ĉe cigana muziko. Noktmeze ni salutis la novan jaron kun glaso de ĉampano, kaj ĉiuj deziris reciproke bonan sanon por la nova jaro. La 1-an de januaro ni ripozis post la streĉo de la silvestra balo. La 2-an de januaro 1972, la prezidanto de la Budapeŝta Komitato adiaŭis nin solene per afablaj vortoj, dankis por nia partopreno kaj deziris bonan vojaĝon kaj feliĉon. Mi neniam forgesos tiujn belegajn tagojn, kiuj tre plaĉis al mi.

Olga Hollenberg

Dua vintra Esperantista Ferio en Budapest

De 29-a de decembro 1972 ĝis 2-a januaro 1973 okazos en Budapeŝto la 2-a Vintra Esperantista Ferio

Partoprenkotizo:	ĝis la 31-a de aŭgusto:	700.— forintoj
	ĝis la 31-a de oktobro:	750.— forintoj
	post la 1-a de novembro:	800.— forintoj
	antaŭpago en iu ajn kategorio:	200.— forintoj

Partoprenkotizo entenas tranoktadojn, manĝadojn trifoje potage, unuafoje tagmanĝon la 29-an, lastfoje tagmanĝon la 2-an de januaro, interkonan vesperon, urborigardon, ekskurson, teatran vesperon, silvestran balon kaj aliajn programerojn, senpagan trambileton. La partoprenantoj kune loĝos en centra studenthejmo en 2—4 aŭ 6-personaj ĉambroj.
La 27-an kaj 28-an de decembro ni povos rezervigi dormlokon (kun maten-, tag- kaj vespermanĝo) potage kaj persone por cent forintoj, se iu volas alveni antaŭ la oficiala malfermo.

Detalajn informojn, programkajeron, aliĝilojn bonvolu peti kaj la aliĝilojn sendi kun la antaŭkotizo (aŭ tuta kotizo) en iu ajn valuto per poŝto, al 1-a Teritoria (Budapeŝta) Komitato de Hungara Esperanto-Asocio Budapest 70, Poŝtkesto 153, Hungario.

INFORMOJ

Ferioj en Bulgario

De la 17-a ĝis la 30-a de septembro 1972 en la pitoreska montara restadejo Pamporovo, kiu situas je 1620 m supermara nivelo, en fabele bela naturo okazos LA ORA ESPERANTO - FERIADO.

Tiun ĉi aranĝon ĉiujare organizas la Distrikta Esperanto-Komitato, urbo Smoljan.

La organizantoj antaŭvidas interalie jenajn programerojn: lingvaj, gajaj kaj amatoraj sportaj konkursoj, ludoj, ekskursoj per aŭtobusoj, montaj liftoj, vizito de naturaj fenomenoj, muzeo-vilaĝo, etnografiaj muzeoj, montaj pintoj, fajrego, rostado de ŝafo sur ligna trapikilo, gustumado de specialaĵoj de la bulgara kuirarto, distingo kaj kolektado de fungoj, projekciado de koloraj diapozitivoj, lingva konsultado; lernada de esperanto-kanzonoj, balo dum kiu estos elektita belulino „Rodopa" kaj multaj aliaj distraj kaj kulturaj programeroj.

La Feriado okazos en la nova, moderna, bela kaj komforta ripozdomo „APK", kiu situas en la centro de la restadejo Pamporovo. Tiu ĉi jaro povos partopreni la Feriadon nur 120 personoj. Limdato de aliĝoj estas la 15-a de aŭgusto 1972. La aliĝojn ni konfirmas.

La unuan manĝaĵon la feriantoj ricevos la 17-an de septembro, vespere, kaj la lastan je la 30a, tagmeze.

Plena pensiono/loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj programeroj/ kostas 70 levojn, aŭ egalvaloran vialandan monon. La Feriadon oni povas partopreni nur por du semajnoj.

Post la Feriado la dezirantoj povas kolektive veturi al urbo Plovdiv por partopreni la Internacian Esperantistan Renkonton, kiu okazos de la 30-a de septembro ĝis la 1-a de oktobro 1972. Oni havos eblecon viziti la malnovan parton de la urbo kaj la Specimenan Industrian Foiron.

Detalajn informojn pri la Feriado kaj aliĝilojn oni povas ricevi de: DISTRIKTA ESPERANTO-KOMITATO, SMOLJAN, BULGARIO. Organizantoj de grupoj, kiuj partoprenas la ORAN ESPERANTO-FERIADON ĝuas rabaton.

DISTRIKTA ESPERANTO-KOMITATO
urbo SMOLJAN

Belega prospekto pri Bulgario

La Komitato pri Turismo publikigis la broŝuron „Bulgario" en Esperanto. Multkolora, kun bela eksteraĵo, ĝi estas bone renkontata de la esperantistaro. Por pluaj informoj turnu vin al Komisiono Pri Turismo, p. k. 66, Sofio.

Esperanto sur ekranoj

Bratislava. — Slovaka Televido (Slovenská Televizia) en Bratislava, Ĉehoslovakio, anoncis, ke ĝi elsendos kurson de la Internacia Lingvo Esperanto en la kvara kvaronjaro de 1972. La kurso konsistos el 17 lecionoj po 26 minutoj.

En januaro populara kanalo de la nederlanda televido lanĉis 20 lecionan Esperanto-kurson, elsendatan kolore kaj nigra-blanke, por nederlandaj kaj belgaj spektantoj. La institucio Teleac, kiu preparis tiun kaj aliajn lingvokursojn por la nederlanda TV, ricevis plurajn demandojn de alilandaj stacioj pri eventualaj adaptoj por ilia uzo. *J.G.S.*

INFORMOJ

El Mongolia Popola Respubliko

La 1-an de decembro 1970 ekstartis esperantokurso en urbo Mureno, ĉe mezgrada lernejo. Sekvis la kurson 28 gelernantoj, finis ĝin sukcese 8 geknaboj. Samtempe okazis Esperanto-kurso por instruistoj en la sama lernejo, kiun vizitis 16 personoj, el kiuj 6 sukcesis la finan ekzamenon. En aprilo 1971 komenciĝis nova esperantokurso, kiun vizitis ankaŭ geboristoj de la urbo (entute 18 personoj) kaj la 25-an de aprilo ekfunkciis nova grupo da kursanoj-gelernantoj en alia lernejo. La kurso estis starigita post insista peto de gelernantoj.

Por helpi la disvastigon de esperanto en Mongolio estas petate, ke oni skribu poŝtkartojn kaj bildkartojn al la novstarigita Esperanto-Grupo. Ĉiuj ricevos respondon: Adr.: Esperanto-grupo, 10-ĵilijn dund surgul, MUREN, Hubsgul ajmag, Mongolio.

Vigla agado en Rumanujo

En la Universitato de Krajovo (Craiova) S-ro Fetoju instruas Esperanton al 63 gestudentoj. Lernas ankaŭ pluraj profesoroj universitataj kaj liceaj. Laŭ raporto de S-ro Fetoju, la sama universitato presigis lernolibron de Jozefo Petrin: verŝajne la unuan aperintan en la rumana lingvo de almenaŭ 30 jaroj. En la Pionira Domo lernas 81 infanoj, kaj el la ŝtata Muzika Liceo kvar grupoj sekvas liajn kursojn. Dudeko da liceanoj el diversaj lernejoj, 15 oficistinoj el la Universitato, grupo da fervojistoj — jen nur kelkaj el aliaj klasoj, kiujn senpage gvidas tiu veterano. Gravan apogon donas al li lokaj aŭtoritatuloj.

(I.G.S.)

GDR-esperantistoj en Soveta Unio

Belan vojaĝon al la urboj Moskvo, Leningrad, Vilnius kaj Riga partoprenis en junio 1971 la esperantistoj R. Weiß kaj E. Nier el Zwikkau. En ĉiuj urboj ili kontaktis esperantistojn, i. a. J. Petrulis, A. Mekys, N. Grigas, J. Biezais, M. Bengmester k. aliaj, kun kiuj ili havis agrablajn interparolojn.

Esperantobücher im „internationalen Buch“

Seit einiger Zeit gibt es in Berlin eine neue große, moderne, internationale Buchhandlung. „Das internationale Buch“, 102 Berlin, Spandauer Str. 2, hält ein Sortiment an Esperantoliteratur bereit. Verlangen Sie eine Angebotsliste!

Auflösung des Kreuzgitters

zum Selbstbauen aus Nr. 52
Die zu beherzigende Aufforderung lautet: Legu „der esperantist“!

Anekdoto

Du policanoj, sekvintaj al personaŭtomobilo, haltigis ĝin. La unua policano deklaris, ke la aŭtomobilisto modele trafikis, kiel ili konstatis post sufiĉe longa persekutado. Kiel premion por tiu imitinda veturado li transdonis al la aŭtomobilisto 200 markojn.
Demandis la dua policano: Kiel Vi uzos tiun monon?
Respondis la aŭtomobilisto: Mi akiros la permeson aŭtomobili.
La apuda edzino deklaris proteste: Ne kredu tion, ebrie li ĉiam parolas sensencaĵojn!
El la fundo de la aŭtomobilo kriis la patro: Kion mi diris antaŭe? — Per ŝtelita aŭtomobilo oni ne povas entrepreni longajn veturadojn . . .

KORESPONDDEZIROJ

Bulgario

f-no Tonka Todorova Djikova, **Bjala,** ul. Šipka 4 okr. Rusenski.

ČSSR

Komencantoj, kolektantoj de bildkartoj pov. skribi al Lada Svoboda, Jasanova 10, **Plzen-Slovany**

„MEDICINISTAJ INFORMOJ" estas neregula cirkulero, aperonta 6 foje dum jaro. Ĝi alportas medicinistajn novaĵojn el la tuta mondo. Jarabono 20 Kčs aŭ egalvaloro (ev 2 US dol). Mendu specimenon ĉe Čeĥa Esperanto-Asocio, medicinista sekcio, **Praha 2,** poŝtkesto 8, Čehoslovakio. La bulteno estas daŭrigo de estinta bulteno Medicinistaj Novaĵoj eldoninta en Česky Dub, Čehoslovakio."

DDR

Dez. korespondi kaj interŝanĝi bk kun esperantistoj el la tuta mondo Friedrich Hrschleb, **DDR-53 Weimar/Thür.,** Henss-Straße 26

Kun polaj amikoj el vojevodio Zielena Gora dez. korespondi Helmut Senger, **DDR-7533 Welzow,** Jahnstraße 29

Hungario

Gejunuloj, 10-18jaraj, dez. korespondi pri ĉiuj temoj kun div. landoj Klubo NESIM-EL, IFJUSAGI HZ, **Gyula**

16 jara knabino dez. koresp. pri fiziko, antikvaĵoj, lerneja vivo. Eva Toth, **Nagyer,** Vasutallanas

13-jara lernantino dez. koresp. kun lernantoj el sesa klaso. Lesku Maria, **Komlo,** Sportvölgy 9 sz.

17 jara gimnazianino dez. koresp., kol. pm, bk. Erzsebet Szoradi, **Györ,** II. k. Becsi ut. 3/e.

Dez. korespondi kun germanaj junuloj pri arto, bk, pm ktp. Josefo Kormon, **Dombovar,** Csiky G 16.

Lernantinoj 17 jaraj, de ekonomia faklernejo dez. koresp. al korespondemaj knaboj el GDR. Jen la adresoj:

Maria Vékony, **Berettyóujfalu,** Péterszegi ut 4. — Katalina Bede, **Berettyóujfalu,** Vöröshadsereg u. 31. — Katalina Nagy, **Berettyóujfalu,** Gábor Aron u. 19. — Eva Szöke, **Artánd.** Rákóczi u. 39. — Helena Szöke, **Artánd,** Rákóczi u. 18. — Irena Gazsó, **Szentpéterszeg,** Nép u. 10. — Irena Gáll, **Artánd,** Lenin ut 9. — Ibolya Szöke, **Artánd,** Rákóczi u. 44. — Irena Kovács, **Berettyóujfalu,** Kossuth u. 39. Középiskolai Diákotthon. — Elizabeto Guth, **Berettyóujfalu,** Rákóczi u. 7. — 17-jara junulino, dez. koresp. pri biologio, historio, lerneja vivo. Knaboj el GDR skribu al Gyöngyi Kadar, **Nagyer,** Damjanich utca 21.

Pollando

Dez. korespondi 23 jara teknistino, Maria Pösluszka, **Wroclaw 17,** Poŝtkesto 1638, pri lit., moderna muziko kaj kino, dez. interŝanĝi bk, gramofondisk., esperantaĵojn.

Studentino de kemio, Danuta Dlutek, **Gdansk-6,** ul. Zbyszka 2. Bogdanca 93/4 dez. korespondi.

Lernanto 14-jara, dez. koresp. Marko Skrabut, Bytom, str. Akaejowa 4/2.

Dez. korespondi Danjo Langa. Bytom, str. Eistreicherow 10/3.

Informoj en esperanto pri turismaj, kulturaj, arkitektaj valoroj de Malsupra Silezio kaj Wrocław — sendas Dolnośląski Ośredek Informacji Turystycznej, Wrocław, ul. Kollataja 31, Pollandoś.

Dez. korespondi kun Berlinanoj Mgr. Jan Makowski, farmaciisto, **Szczecin 2,** str. Jablonkowska 7 m 3 tel. (labore) 455—19

Deziras korespondi:

s-ano Jozef Rogovski, **Bytom,** Str. Zeromskiego 3/13. Prez. de la klubo „Esperantujo"

s-ano Romuald Wolski, **Bytom,** Str. B. Chrobrego 8/3, instruisto, naskiĝjaro 1948

s-ino mgr. Kristina Dobrowska, **Bytom,** Str. Smolenia 9/4, komencanta esperantistino, naskiĝjaro 1936

s-ano Janusz Tywoniuk, **Bytom,** Str. B. Prusa 44/10, prezidanto de la Teatro en Bytom, naskiĝjaro 1940

Monka Maria, Swietochłowice — 4 Str. **Boczna 1,** fraŭlino naskiĝjaro 1940

Teresa Krol, **Bytom,** Str. Odrzanska 32, fraŭlino, naskiĝjaro 1950

Danuta Lange, **Bytom,** Str. Eistreichera 10/3, fraŭlino, naskiĝjaro 1954.

Henryka Wronska, **Bytom,** Str. Wolności 3/6, naskiĝjaro 1924

Alicja Rutniewska, **Bytom,** Str. Kwietniewskiego 11/4, fraŭlino naskiĝjaro 1950

s-ino Cicha Stefania, **Bytom,** Str. A. Ludowej 6/15, fraŭlino, naskiĝjaro 1948

mgr. Florentino Tyblewska, **Bytom,** Str. Matejki 10/12, denaska esperantistino, naskiĝjaro 1923

Anna Kalin, **Bytom,** Str. Francuska 3, fraŭlino, naskiĝjaro 1955, kantistino

Herausgeber: Deutscher Kulturbund (Zentraler Arbeitskreis Esperanto der DDR). Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstraße 60. Fernruf: 22 59 91.
Verantwortl. Redakteur: Detlev Blanke. Redaktionskommission: Otto Bäßler, Dr. Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Willi Vildebrand. - Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: VEB Druckwerkstätte Glauchau
III-12-8 482